



AKTIVULA MATURIGO (AMO)

Programo de Universala Esperanto-Asocio (UEA) lanĉita en 2014.

Rekomendoj el la 18a seminario de la AMO-progrAMo, okazinta en Závažná Poruba, Slovakio inter la 7a kaj la 10a de januaro 2016

Ĉeftemo: Kiel organizi E-vojaĝojn kaj turismajn ekskursojn

La seminario okazis omaĝe al Andreo Grzębowski

KONKLUDOJ

La partoprenantoj de la seminario:

konstatas, ke la seminario atingis siajn celojn kaj dum la tagoj de la seminario prelegis ok prelegantoj, okazis trejnado por preparo de planado de vojaĝoj kaj turismaj ekskursoj, praktike estis montrita preparo kaj realigo de geografia kvizo dum tri vesperoj kaj estis gvidata geografia lingva kurso,

konsideras, ke la organizado de la seminario kadre de la renkontiĝo de esperantistoj-vojaĝantoj estis bona ideo, kiu ebligis profundigi organizajn kapablojn de ĉiuj partoprenantoj, ĉar la seminarion partoprenis ĉiuj partoprenantoj de la renkontiĝo,



Seminarianoj praktikas tuj tion, kion ili studis. Jen la rezulto. La grimpintoj de monto Poludnica (1540 m) kun fone panorama vido de la pintoj de la Altaj Tatroj. Jen regiono vizitebla kadre de la 101a UK en Nitra.

Foto: Vlado Škuta.

proponas al tutmondaj tegmentaj E-organizaĵoj kaj institucioj, kiel ekz. UEA, TEJO, ILEI, SAT, iniciati kreon en siaj ttt-paĝoj de parto, kiu helpos al esperantistoj facile kaj malmultekoste vojaĝi, ĉefe al esperantaj okazaĵoj kun informoj pri favorprezaj trafiko kaj loĝado,

konstatas, ke por plua evoluo de E-movado estas grave organizi eventojn, kiuj ligas praktikan uzon de Esperanto kun anima kaj fizika agado. La ideala kampo por realigo de tiu ĉi celo estas organizado de turismaj ekskursoj, ekspedicioj kaj renkontiĝoj,

konstatas, ke multaj esperantistoj-vojaĝantoj kaj turistoj agadis pli larĝe ol nur en esperanta kampo kaj kontribuis al evoluo de homaj societoj, sed en naciaj skaloj estas malmulte konataj,

alvokas vikipediistojn krei turismajn paĝojn kaj kategoriojn pri esperantistoj vojaĝantoj,

invitas kunlabori ĉiujn kapablajn esperantistojn al traduko de esperantaj paĝoj de Vikipedio al naciaj lingvoj pri tradiciaj esperantaj turismaj renkontiĝoj kaj vojaĝoj, same traduki paĝojn pri esperantaj vojaĝantoj,

dankas al UEA, ke ĝi subtenis la seminarion kadre de la AMO programo.

En Závažná Poruba (Slovakio, Eŭropo), 10. 1. 2016

Pliaj informoj pri la plena aranĝo Poludnica:

<http://www.poludnica.esperanto.sk/index.php?akcia=info&kategorio=5&co=71>

Multaj fotoj kaj filmoj en *YouTube*. Estas alireblaj pere de: lek.esperanto.sk

Originale alkroĉaĵo al la Estrara Komunikado (EKO) numero 2016/2.